# la naska fasko

*La ĉiutaga ĵurnalo de la Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto*

Numero du
2009-06-30
mardo

## Kio okazos hodiaŭ?

- ★ **3:00 ptm: Eksurseto al la glisilejo**
  *Kie:* renkontiĝu antaŭ la loĝejo *Asante*; de tie ni iros piede.
- ★ **7:30 ptm: Shai Mor gvidos diskuton pri Esperantaj temoj**
  *Kie:* renkontiĝu en la komuna salono ĉe la teretaĝo (unua etaĝo) de la loĝejo *Cuzco*

## Marborda promeno

Je la 3-a ni promenos proksimume dek kvin minutojn por atingi la glisilejon *Torrey Pines*, kiu situas proksime de niaj loĝejoj.

La glisilejo (angle: *gliderport*) troviĝas sur alta marborda klifo, de kie oni povas rigardi glisilojn (aŭ eĉ flugi en ili), aĉeti trinkaĵojn, kaj ĝui la vere belegan vidaĵon. De la glisilejo oni povas vidi surfistojn, ruliĝantajn ondojn, mejlojn da plaĝo, kaj—se ne estas tro nebule—la urbeton de La Jolla.

Ni restos ĉe la glisilejo dum nur duonhoro (aŭ malpli) kaj revenos. Apude troviĝas longa, kruta ŝtuparego kiu kondukas malsupren al la plaĝo *Black's Beach*, tre ŝatata loko de surfistoj kaj naturistoj (senvestemuloj). Ni ne iros tien hodiaŭ, sed kompreneble vi rajtos pluiri post la ekskurseto, se vi volas.

**Kunportu fotilon, se vi havas.** La suno ŝajne brilos brule, do ne forgesu ankaŭ sunĉapelon kaj kontraŭsunan kremon!

## Shai gvidos diskuton

*[Jen invito de Shai al lia diskuto hodiaŭ vespere…]*

Saluton al ĉiuj lernantoj, mi volas oferti al vi partopreni en neformala renkontiĝo pri diverspecaj Esperantaj temoj. Ni renkontiĝos je la 7-a horo kaj duono posttagmeze en la komuna salono (en Cuzco) dum du horoj.

Jen ebla temo: "Kiel plej bone prezenti Esperanton?" Mi preferas ne diri, "Mi parolas Esperanton" sed anstataŭe "Mi parolas la *internacian lingvon Esperanto*." Kial? Nu, venu por ekscii…

## Pri bibliotekoj

Pluraj lernantoj petis pli da informo pri la bibliotekaj horoj. Jen kelkaj gravaj detaloj:

***Pacific Studies Library*** estas malfermita lunde ĝis vendrede, de 9:00 atm – 6:00 ptm. Ĝi estos fermita semajnfine kaj la 3-an de Julio.

***Geisel*** estas malfermita lunde ĝis ĵaŭde de 7:30 atm – 10:00 ptm, vendrede de 7:30 atm – 7:00 ptm, sabate de 10:00 am – 6:00 ptm kaj dimanĉe de 10 atm – 10 ptm. Ĝi estos fermita la 3-an kaj 4-an de Julio.

# Pli pri bibliotekoj…


Oni demandis ankaŭ pri la komputiloj en la bibliotekoj, kaj ĉu oni bezonas pasvorton por uzi.

La biblioteko *Geisel* havas ĉirkaŭ 300 publike uzeblajn komputilojn; ĉar vi estas studentoj vi rajtas uzi ilin sen ajna pasvorto aŭ konto. Ankaŭ la biblioteko *Pacific Studies Library* (apud niaj loĝejoj) havas kelkajn publikajn komputilojn.

Por presi dokumentojn oni devas unue aĉeti debetkarton; vendmaŝinoj por la debetkartoj troviĝas en ĉiuj bibliotekoj tra la kampuso. La prezo de karto estas $1 (vi bezonos bileton), kaj poste vi povos uzi la samajn vendmaŝinojn por aldoni monon al via karto. Presado per griza inko kostas po $0.10 paĝe; kun multkolora inko po $0.50 paĝe.

# Naĝejoj

Finfine oni demandis pri la loko de la naĝejo; ŝajne ĝi **ne** troviĝas en la granda sportejo *RIMAC*, kiel diris la manlibro. (Pardonon pro la eraro!) En *RIMAC* vi trovos gimnastikejon. La naĝejo estas tamen en alia loko: *Canyonview Aquatics Center*. Ĝi troviĝas oriente de *Price Center* ĉe *Voigt Drive*. La horaro estas 9:00 atm – 8:00 ptm lunde ĝis vendrede, kaj 11:00 atm – 4:00 ptm semajnfine. Vi bezonos vian identokarton por eniri.



## Komuna libromendo

Jam kelkaj lernantoj elektis partopreni en nian komunan libromendon de Esperanto-USA. Por certigi, ke la libroj alvenu ĝustatempe, mi preferas mendi ĉion ĉi-vendredon. Do se vi volas partopreni, bonvolu kontakti min kiel eble plej frue. Mi akceptos kontantan monon (angle: *cash*), do vi ne bezonas kreditkarton. Simple donu al mi liston de libroj, kaj mi petos pagon poste, kiam ili alvenos.

## Anonceto de Doroteo

Se vi volas informon pri usonaj Esperanto-ekzamenoj, kontaktu al Doroteo HOLLAND en ĉambro *Cuzco 112*.

❧

If you would like information about U.S. Esperanto examinations, see Dorothy Holland in Cuzco 112.

## Kiu loĝas kie?

**Asante 125**
Uwe MEYER *(alvenos poste)*
Tor KINLOK
Marko MENICHETTI
Harold GOODMAN

**Asante 126**
Eduard KUSTERS
Vernero MOELLER
Reni PORTER
Andrew MCCONNELL

**Asante 127**
Lee MILLER
Hoss FIROOZNIA

**Asante 221**
Aaron ALBRECHT
Nick KALIVODA
Neal WILEY
Micah BALES
Drissa DIAKITE *(ankoraŭ ne alvenas)*

**Cuzco 111**
Vido GILLETT
Koto FARMER

**Cuzco 112**
Dori WHEELER
Doroteo HOLLAND
Betty REFIOR

**Cuzco 113**
Bernard TUIDER
Shai MOR
Richard ANDREW-CONNOLLY
Gary ANDERSON

**Cuzco 116**
Ron GLOSSOP
Franklin MONTENEGRO
Juan TORRES
Keneĉjo GOLDBERGO

**Cuzco 117**
Kristy LOMMEN
Ina CENTAUR
Christine WINGROVE
Anjo HARLOW

**Cuzco 118**
Spomenka ŠTIMEC
Ellen EDDY

*La NASKan Faskon* redaktas via afabla helpinstruisto Hoss, sed **li nepre bezonas vian helpon!** Ne timu, se vi ne sentas vin komforta pri verkado; Hoss helpos vin korekti kaj poluri. Ĝuste nun li *senpacience* kaj *avide* atendas viajn kontribuojn—ĉu fotojn, desegnaĵojn, artikolojn, poemojn, amo-leterojn… kion ajn. Sendu viajn materialojn perrete al **<nask.esperanto@gmail.com>** aŭ portu ilin piede al Asante#127.

# La nekonata historio de la nomo *Kalifornio*

*Jen artikolo el la NASKa arĥivo; ĝi sendube utilos al lernantoj el foraj mondopartoj, kiuj neniam antaŭe havis okazon viziti Kalifornion. Ekzistas pluraj disputataj teorioj pri la deveno de la nomo "Kalifornio"—sed nur unu vero, kiun malkovris Esperantisto…*

En la praepokoj de la regiono kie nun troviĝas la usona ŝtato Kalifornio loĝis popolo kies nomo estis "la Kalli". Ili ĉefe estis pacemaj, sed foje interbatalis ĝismorte kun aliaj lokaj triboj. Restas malmultaj spuroj de tiu ĉi popolo, sed esploroj indikas parencecon kun la fiĝianoj. Estas tute eble ke la unuaj Kalli-homoj alvenis el Fiĝioj al la okcidenta marbordo per grandaj kanotoj tra la oceano Pacifiko. Kompreneble estis kelkaj grupoj de la Kalli kiuj loĝis ĉi tie, kie nun estas San-diego, kaj adoris la Sun-Diegon kies statuon ni povas vidi ĉiutage en la tereno de UCSD.



Antropologiaj kaj arĥeologiaj esploroj indikas ke la Kalli estis kanibaloj, ne surprize ĉar tiel estis la fiĝianoj ĝis la pasinta jarcento. Ili uzis homan karnon kiel ĉefpladon, kiel ingrediencon en hom-tortoj (rimarku: ne pom-tortoj!), kaj en hakita miksaĵo kun terpomoj kaj cepoj.

La hom-tortoj estis unikaĵo de la Kalli—neniu alia konata pragrupo bakis tortojn, kun aŭ sen homa karno. Kutime temis pri la karno de mortigitaj malamikoj, sed foje temis pri bopatrino aŭ malbonkonduta bubaĉo. (Aŭ eĉ de ĉefo kiam troaltiĝis la impostoj).

Ŝajne lertaj bakistoj, la Kalli konstruis en ĉiu vilaĝo grandan komunan bakfornon, kun arka formo kaj sufiĉe grandan por komforte kuŝigi korpon aŭ tortaron. Malaperis la plejmulto de la bakfornoj, sed iuj suspektas ke la restaĵojn kelkloke oni enkonstruis en la hispanajn monaĥejojn kiuj estas famaj nun en la regiono. La arka formo iom montras al tia rilato.

La hispanoj kiuj alvenis tre rapide konsciis pri la kutimoj de la indiĝenoj. Ili baldaŭ nomis ilin la Bakforn-Kalli, por distingi ilin de alia (eble parenca) tribo kiu vivis pli norde.

Per tipa misformigo, iom post iom la nomo iĝis "la Forn-Kalli", kaj finfine iu anglo, ĝuste antaŭ bakiĝo, ekkriis "Ho, la Kalli-fornoj!" Kaj ek de tiam la lando nomiĝas "Kallifornujo"… bonvenon en Kalifornio!

—Prof. Unda Miskom Preno
*Ĉefo de la Arĥeologia Frako en la Unimalversitato de Suda Kukurbo*